

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

39-a Jarkolekto - Marto 2025 - N-ro 136

HUELMA (Jaeno)



Januaro / Marto 2025

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.
P. 06 Zelenskij, Trump kaj...
Gromiko
P. 09 Lingva Angulo:
El acusativo de medición.
P. 13 Poezia Angulo.
P. 14 Nuntempa Vortaro:
Informadikaj aparatoj.
P.17 Folioj por Praktikado.
P.21 Turismi en ... *Huelma (Jaeno)*
P. 24 Notoj pri Esperanto kaj
*Andaluzio: Antaŭ cent jaroj en
Kordovo.*
P. 28 $E=mc^2$ Scienca Angulo:
*La teorio de la infinitaj
tajpantaj simioj.*
P. 30 Flamenko: *Antonio Núñez
Montoya, "El Chocolate".*
P. 32 Fervojista angulo:
*La stacidomo en la Placo
Armas en Seviljo.*
P. 34 Komikso: *La milionjara
pikniko.*
P. 41 Nun Ni. Junularaj Paĝoj.
P. 43 Ŝako: *Gambitoj.*
P. 45 Andaluzia kuirarto: *Ajoatao
laŭ la jaena stilo.*
P. 47 Misteroj kaj Legendoj de
Andaluzio:
La karmezina koloro.
P. 49 Vorto-ludoj.

Gazeto Andaluzia

*Fundada por D. José Garzón Ruiz,
en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la Asociación
Andaluza de Esperanto.*

EDITA: Asociación Andaluza de
Esperanto
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López
REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante



*Sur la kovrilo:
Vidaĵo de Huelma (Jaeno)*

ESPERANTO EN ANDALUZIO

Esperanta Lingva Festo ĉe Sevila Mezlernejo

La pasintan 24-an de aprilo okazis en la sevila mezlernejo "Diamantino García Acosta" lingva renkontiĝo. Temis pri ekspozicio pri idiomoj kaj lingvaj aferoj. Gabriela kaj Viko, sevilaj esperantistoj, estis invititaj prezenti Esperanton.

Ili jam kreis ludon, kun la nomo "Anto", kiu allogas la internacian lingvon ĉe festa etoso. Ĉi-foje partoprenantoj, kiuj estis gelernantoj de tiu mezlernejo, ludis grupete. Komprenoble ne ĉiuj interesiĝis pri la lingvo, tamen aliaj scivolemis kaj demandis pri rimedoj lerni la internacian lingvon.

Gabriela (10-jaraĝa) klarigis pri ĉio, solvis dubojn kaj gvidis gelernantojn dum la ludo.



El juego del
Esperanto



Andaluzo premiita en la konkurso "Francisko Mañez"



Kultura Societo Ateneo la Alianco de Ceste (Valencio) kunlabore kun la Urbodomo de Ceste, la Fondaĵo Cajacheste, la Esperantista Grupo Lumradio de Ceste kaj la Grupo Esperanto de Valencio organizis konkurson de ideoj, kies celo estis promocii la internacian lingvon tutmonde, invitante ĉiujn interesatajn homojn prezenti novigajn ideojn por antaŭenigi la lernadon, uzon kaj agnoskon de Esperanto.

Pablo Busto, de Dos Hermanas (Sevilo) atingis la duan premion en la konkurso, laŭ informo diskonigita la pasintan monaton aprilon. La projekto de Pablo temis pri la utiligo de interretaj amuzado-platformoj, kaj specife, tiuintence disvolvigi la projekton *Aperu!*.

Ĉi tiu projekto temas pri la mezurado de la populareco de afiŝataj filmetoj ĉe la platformo *Tubaro*, regata de Pablo. Tio estas, oni pretendas premiojn la plej popularajn filmentojn kaj tiel instigi kaj subteni la kreantojn.

Portugalaj gesperantistoj vizitis Kordovon



La pasintan monaton Marto vizitis Kordovon paro da portugalaj esperantistoj, Igor kaj Ines Cerejo. Ili trapasis la urbon survoje al flamenka festivalo. Dum kelkaj horoj ili estis akompanitaj en la urbo, tiam ili povis promenadi tra la antikva kvartalo de Kordovo kaj kompreneble trinki freŝan bieron.

REAKTIVIĜIS LA BANKO-KONTO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Post kelkaj problemoj kun la banko okaze de la administrado de nia banko-konto, ni plezure informas al niaj membroj kaj simpatiantoj, ke la banko-konto:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Reaktiviĝis!

Se vi apogas kaj deziras kunlabori kun la Esperanto-movado en Andaluzio, ni proponas al vi membriĝi en Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La jara kotizo estas 20 €, pageblaj en tiu banko-konto. Ni petas al vi, post la pago, sendi ret-mesaĝon al info@esperanto.ac, por informi pri la pagita kotizo. Multan dankon kaj ni kalkulas kun via kunlaborado.



VUELVE A ESTAR ACTIVA LA CUENTA DE LA ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO

Después de algunos problemas con la entidad bancaria por la gestión de nuestra cuenta bancaria, anunciamos a todos nuestros socios y simpatizantes que la cuenta:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

¡ Vuelve a estar activa !

Si apoyas y quieres colaborar con el movimiento esperantista en Andalucía, te invitamos a hacerte miembro de la Asociación Andaluza de Esperanto. La cuota anual es de 20 €, que puedes abonar en la cuenta antes indicada. Te rogamos que tras hacer el pago envíes un correo electrónico a info@esperanto.ac, informando del abono de la cuota.

Muchas gracias y contamos con tu colaboración.



Zelenski, Trump kaj ...

Gromiko

Sur pasinta numero de nia revuo ni parolis pri la teorio "Gromiko". Laŭ ĉi tiu teorio se du homoj diskutas per malsimilaj lingvoj pri grava afero, ekzemple pri internacia politiko, neniu el ili devas rezigni uzi sian propran lingvon, do ili ne devas diskuti per la lingvo de la alia debatanto, eĉ se li sufiĉe bone regas la alies idiomon.



Prezidantoj Volodimir Zelenskij kaj Donald Trump en la Blanka Domo la pasintan 28-an de februaro.

Andrei Gromiko, iam ministro pri internaciaj aferoj de Sovet-Unuiĝo, regis bone la anglan lingvon. Li estis ambasadoro en Usono dum multaj jaroj, tiam li uzis tiun lingvon okaze de diskursoj kaj intervjuoj kun ĵurnalistoj. Tamen, kiam li debatis kun reprezentantoj de Usono, li neniam uzis la anglan lingvon, male li preferis paroli sian denaskan lingvon: la rusan. Tiuokaze, li uzis servojn de tradukistoj por komprenigi siajn paroladojn. Gromiko asertis, kaj li evidente pravis, ke lia kono pri la angla lingvo neniel estus komparebla al la nivelo de la usonaj reprezentantoj, kies patrina lingvo estis la angla. Tiu diferenco estus decida se paroli pri internaciaj aferoj.

Pravigo de ĉi tiu teorio evidentiĝis okaze de la renkontiĝo ĉe la Blanka Domo, la pasintan 28-an de februaro, inter la ukrainia prezidento Zelenskij kaj la usonaj prezidento kaj vicprezidento Trump kaj Vance. Dum ĉi tiu renkontiĝo Volodomir Zelenskij, kiu havas kiel denaskan lingvon la rusan, uzis la anglan. Oni devas akcepti, ke li sufiĉe bone parolas la anglan lingvon, tamen neniel je la sama nivelo ol la aliaj partoprenantoj en la debato, Trump kaj Vance.

Vere, la celo de Zelenskij estis laŭdinda, tiel pro sia emo uzi la anglan li deziris kontakti rekte vizaĝ-vizaĝe, kun la debatantoj kaj eĉ kun la televida publiko. Tamen, laŭ fakuloj li fiaskis, pro la fakto ke li trovis problemojn en la konstruado de frazoj kaj en la uzo de taŭgaj vortoj dum la konversacio.



Ankaŭ usona vicprezidanto James D. Vance partoprenis en la akra debato.

Por diskonigi sian mesaĝon Zelenskij pene serĉis taŭgajn vortojn en lingvo, kiu ne estas lia denaska esprimilo. Alie, ĉi tio eventis dum danĝera momento, tio estas, kiam li estis pridemandita abrupte, preskaŭ violente, de la usonaj prezidento kaj vicprezidento antaŭ televido de la tuta mondo. Uzante sian gepatran lingvon la aliaj debatantoj metis al prezidento Zelenskyij ĉe suba pozicio, pro la fakto ke evidente Trump kaj Vance trovis kaj uzis nature la plej taŭgajn vortojn kaj esprimojn en ĉiu momento.

Kial prezidento Zelenskij ne uzis la servojn de tradukisto? Laŭ fakuloj pri komunikado, kiam oni elsendas mesaĝon pere de tradukisto dum konversacio, eĉ plie dum televida intervjuo, oni ne havigas efike la mesaĝon al aŭskultantoj. Pro tio, usona televid-kompanioj konsilas paroli kaj

respondi ĉiam en la angla lingvo, anstataŭ esti helpita de tradukisto. Verŝajne ili supozas, ke ĉiuj en la tuta mondo parolas sufiĉe lerte la anglan lingvon. Tamen, ĉi tio ne estas reala. Eble pro tio, Zelenskij pensis, ke okaze de debato kun Trump, respondoj al demandoj de ĵurnalistoj pere de tradukisto malpliigus verecon kaj kortuŝon al sia mesaĝo.

Ankoraŭ oni ne konas la konsekvencojn de tiu debato Trump-Zelensky, kvankam ĵurnalistoj asertis, ke tiuj dek minutoj ja ŝanĝis la sencon de la milito en Ukrainio malfavore al Zelenskij, tamen, laŭ vidite, tio jam okazis eĉ antaŭ la diskutoj, ĝuste tiam kiam la ukrainia prezidanto alvenis en la Blankan Domon.

Ĵurnalistoj kaj sociologoj jam pristudas ĉi tiun renkontiĝon, ĝi estas proponata kiel ekzemplo de senprecedenca kolizio. El la lingva vidpunkto tio, kio ja estas tute pruvita estas la fakto, ke neniu devus rezigni paroli en sia propra lingvo kiam gravaj aferoj troviĝas sur la diskuto-tablo, eĉ se iu el la parolantoj konsideras, ke li parolas sufiĉe bone la anglan lingvon. Evidente Andrei Gromiko pravis.



Andreo Gromiko
1909 ~ 1989



***Ĉu vi deziras kunlabori kun
nia revuo ?***

***Ni bonvenigas viajn artikolojn, fotojn,
desegnaĵojn, informojn ktp.***

Kontaktu kun: info@esperanto.ac



En esperanto, cuando hablamos de acusativo, lo usual es que nos refiramos a la terminación "-n" que se añade al sustantivo y al adjetivo cuando actúan como objeto directo. Ya sabemos que de este modo, se distingue en la oración el sujeto -que no lleva ningún final específico-, del objeto directo -que termina en "n".

Por ejemplo: *Mi legas libron.* Yo leo un libro.

También hemos visto el acusativo de dirección, que nos indica el destino de un verbo de movimiento:

Mi iras tien. Yo voy allí. (camino de allí).

Hoy vamos a hablar de otro acusativo, al que llamaremos "acusativo de medición". Por simple descarte podemos decir, en primer lugar, que este acusativo no se refiere ni al objeto directo, ni al destino de un verbo de movimiento. Realmente se trata del indicativo que usamos para indicar dimensión, duración, distancia, peso, precio, edad... es decir, se refiere al resultado de una medida. Tras este acusativo de dirección aparece un adjetivo o un adverbio que nos indica el valor a que se refiere esa medición.

Veamos todo esto de un modo más simple y claro.

Cuando preguntamos:

Kiom alta estas la Eiffel-turo?

¿Cuánto mide la torre Eiffel? (lit. "¿Cuánto de alta es la torre Eiffel?")

La respuesta sería:

La Eiffel-turo estas 324 metrojn alta.

La torre Eiffel mide 324 metros de alto.

Para indicar el resultado de una medida usaremos el acusativo "-n", al que puede seguir el adjetivo o adverbio que nos indica el valor a que se refiere la medición.

Como hemos indicado, al resultado de la medición le puede seguir el adjetivo o el adverbio a que se refiere el concepto medido (distancia, altura, peso, edad, etc).

Ejemplos:

• *Kiom pezas elefanto?* ¿Cuánto pesa un elefante?
Elefanto pezas unu tunon. Un elefante pesa una tonelada.
Elefanto estas unu tunon peza

• *Kiom granda estas futbol-kampo?*
¿Cuánto mide un campo de fútbol? (lit. "¿Cuánto de grande es....?")

Futbol-kampo estas 7000 kvadratajn metrojn area.
Un campo de fútbol mide 7000 metros cuadrados.

• *Kiom da tempo daŭras basketbal-matĉo?*
¿Cuánto tiempo dura un partido de baloncesto?

Basketbal-matĉo daŭras 40 minutojn.
Basketbal-matĉo estas 40 minutojn daŭra.
Un partido de baloncesto dura 40 minutos.

Como hemos visto, podemos responder a la pregunta sobre una medida de dos maneras: la primera usando un verbo de medición "*daŭri, aĝi...*", o de otra manera podemos también usar el verbo "*esti*" añadiendo el concepto medido, bien como un adjetivo o como un adverbio. Así:

Kiom da jaroj vi aĝas? ¿Cuántos años tienes?
Mi aĝas 30 jarojn. Tengo 30 años.
Mi estas 30 jarojn aĝa.

¿Cuándo usaremos un adjetivo y cuándo un adverbio?

Utilizaremos la terminación (-a) cuando claramente se desprenda que es un adjetivo lo que define la medición (alto, bajo, ancho...). Usaremos la terminación (-e) cuando se desprenda que es un adverbio (antes, después...).

Ejemplos:

Mi estas 30 jarojn aĝa. (verbo *esti* + adjetivo)

Tengo 30 años de edad.

Mi kapablas levi 50 kilogramojn pezan. (verbo transitivo + adjetivo)

Soy capaz de levantar 50 kilos de peso.

Kelkajn minutojn antaŭe mi konis la novaĵon.

Algunos minutos antes yo conocía la noticia.

Ŝi alvenis du horojn poste.

Ella vino dos horas después.



Sizifo devis suprenruli rokegon, kiu estis kelkan tunon peza, tra deklivo. Kelkajn momentojn poste, jam sur la pinto, la rokego denove falis.

Así que, en resumen:

- Cuando indiquemos una medida en una frase utilizaremos el acusativo.
- Podemos utilizar un verbo de medida + acusativo.

Mia parolado daŭros tri minutojn.

- Si no usamos un verbo de medida, sino el verbo "esti" indicaremos el concepto medido como un adjetivo (-a).

Mia parolado estos tri minutojn longa.



La monda rekordo en salto per stango apartenas al sveda atleto Armand Duplantis, lia plej rekorda salto estas 6'25 metrojn alta aŭ li saltis 6'25 metrojn.



En Dubajo oni konstruis "La Turon de la Kalifo", kiu estas 828 metrojn alta, aŭ ĝi leviĝas 828 metrojn de la tero.





Luis de Góngora y Argote
1561 ~ 1627

Je Kordovo

Ho muro, ho vi altiĝantaj turoj
Fieraj signoj de majest' belego,
Ho reĝa andaluzia riverego
Kun ĉarmaj bordoj antaŭ viaj muroj.

Ho ebenaĵ' fruktoporta, ho montaroj
Sur kies suproj kuŝas suna oro,
Ho patra urb', plej kara vi al koro,
Por skribaj kaj heroaj gloraj faroj!

Se en la fama urbo historia
De l' Darro, de l' Genil eĉ nur penso
Pri vi perdiĝus, perlo kordovana

Neniam rajtu mi per vido mia
Pri turoj ĝoji, muroj kaj rivero
Pri montoj kaj eben', ho floro hispana!


Esperantigis: Joseph Berger en la jaro 1925






NUNTEMPA VORTARO

Informadikaj aparatoj



Ekrano



Klavaro



Presilo



Kap-aŭdiloj



Mikrofono




Tekokomputilo




Komputila muso



Tabul-komputilo




Laŭt-paroliloj



Cifereca projekciilo



Kablo



Poŝmemorilo aŭ
memorbastoneto




Modemo




Ret-kamerao




Baterio




Blato



Fulmomemorono



Cirkvito



Konektilo




Skanilo




Man-skanilo



Diskaparato / Durdisko



Ŝargilo



Kompakta disko



Ekstera diskaparato




Presil-kartoĉoj



Komputila ĉeftabulo



Disketo



Procesoro



Folioj por praktikado

Teo: la plej amata trinkaĵo de la mondo

Ĉu vi faris **tason da teo** hodiaŭ? Vi ne estis **sola**. Teo estas **la dua plej konsumata** trinkaĵo en la mondo; la unua estas akvo. Teo havas longan historion tra la tuta mondo.

Laŭ legendo, la reganto Shennong de Ĉinujo **malkovris** teon en la jaro 2737 **aK**. Dum li boligis akvon sub arbo, kelkaj folioj falis **en lian poton**. Li ŝatis la trinkaĵon kaj komencis studi ĝin. Teo **fariĝis** valora komence pro siaj kuracaj **ecoj**, sed poste ĝia uzado malrapide evoluis al ĉiutaga trinkado. Sed dum multaj jarcentoj oni trinkis teon nur en Ĉinujo.

Budhana monaĥo, Saichō (767-822), estis la unua, **kiu portis teon ekster Ĉinujon**. Li iris al Ĉinujo por **profundiĝi** en studado de budhismo, kaj kiam li reiris hejmen al Japanujo ĉirkaŭ la jaro 805, li kunportis te-sembajn.

Poste, **danke al** tutmonda **komercado** (kaj la kresko de la Brita Imperio), homoj komencis kultivi teon ĉirkaŭ la mondo.

> tason da teo

La preposición "da" equivale a "de" en español, pero no tiene ni un sentido de propiedad, ni tampoco de origen. Se utiliza para indicar la cantidad o la medida de algo. Veamos algunos ejemplos:

- *Mi aĉetis du kilogramojn da terpomoj.*
Yo compré dos kilos de patatas.
- *Amaso da homoj ĉeestis la spektaklon.*
Una masa de personas asistió al espectáculo.
- *Glaso da varma lakto estus tre bonvena.*
Un vaso de leche caliente sería muy apetecible.

"En lia potu" significaría que algo está en la cazuela. Pero si utilizamos el acusativo de dirección "en lian poton" indica que algo va hacia dentro de la cazuela, dándole a la frase un sentido de movimiento.

En la frase que se propone en el texto se dice que:

Kelkaj folioj falis en la poton.

Algunas hojas cayeron en la cazuela.

Evidentemente si cayeron es porque se estaban moviendo.

> aK

En español decimos "a.C." y "d.C.", antes o después de Cristo, para indicar una época concreta. En esperanto usamos "aK" antaŭ Kristo o "pK" post Kristo. Podemos usarlo también con puntos "a.K." "p.K."

> fariĝis

Recordemos el sufijo reflexivo "-iĝ". En el ejemplo que se propone en el texto se utiliza con el verbo "fari" (hacer). "Fariĝi" podría traducirse como "hacerse, convertirse".

- *Teo fariĝis valora.* El té se hizo valioso.
- *Ĉielo fariĝis tute obskura.*
El cielo se volvió (se hizo) totalmente oscuro.

> ecoj

Recordemos que en esperanto los prefijos y los sufijos pueden convertirse en palabras por sí mismas, simplemente se le añadiría la terminación "-o" si lo convertimos en un sustantivo, "-a" si se trata de un adjetivo; "-e" si es un adverbio, etc.

El sufijo "-ec" indica una cualidad abstracta, así:

- *Libera* (libre) • *Libereco* (libertad)
- *Bona* (bueno) • *Boneco* (bondad)

Convertido en un sustantivo por sí solo "eco" significaría "cualidad". En la frase que aparece en el texto:

- *Teo fariĝis valora komence pro siaj kuracaj ecoj.*
El té se volvió valioso al comienzo por sus cualidades curativas.

> kiu portis teon ekster Ĉinuĵon

En esta frase aparecen dos palabras en acusativo "teon" y "Ĉinuĵon".

Teon es el objeto directo en la frase:

- *kiu portis teon* quien/el cual llevó té

Mientras que "ekster Ĉinuĵon" se trata de un acusativo de dirección, indicando el movimiento que da a entender el verbo "porti" (llevar).

- *kiu portis teon ekster Ĉinuĵon.*
quien/el cual llevó té fuera de China.

> profundigi

Nos encontramos de nuevo con el sufijo "iĝ", que convierte en reflexivo al verbo de la raíz. En este caso:

- *Profundi* Profundizar
- *Profundiĝi* Profundizarse

> Danke al

Literalmente significa "gracias a". Podemos encontrarlo incluso como "dank' al".

- *Dank' al lernado de esperanto mi povis vojaĝi tra la tuta mondo.*
Gracias al aprendizaje del esperanto pude viajar por todo el mundo.

> komercado

El sufijo "ad-" expresa la idea de algo que se repite.

- *Marteli* Dar un martillazo (un único golpe).
- *Marteladi* Martillar (seguido, una y otra vez).
- *Pafo* *Disparo*
- *Pafado* *Tiroteo (un disparo tras otro)*

En la frase que se propone en el texto:

- *danke al tutmonda komercado.*
gracias al comercio mundial

Expresa la idea de que no se trata de una única transacción comercial (komerco), sino de un comercio continuo (komercado).



Sude de Jaeno, tuj apud la granada provinco, ĉe la regiono Siero Magina, stariĝas bela vilaĝo, plena de zigzamaj stratoj kun blankaj domoj sub la ruinoj de antikva kastelo. Temas pri Huelma, konata kiel "*la malgranda Granado*".


Iberoj estis la unuaj enloĝantoj en tiu teritorio. Poste alvenis romianoj, tamen ili fondis tie neniun setlejon, malgraŭ tio, tie troviĝas tiuepokaj tombejoj, tombo-ŝtonoj kaj restaĵoj de romia akvedukto trapasanta la zonon.

La nuntempa Huelma estis fondita en la 9-a jarcento, dum la omajada emireco en Al-andaluso. La nomo ricevita estis "Walma", kies signifo

estas "Fonto de akvo", interkrampe oni devas diri, ke en Alĝerio ekzistas vilaĝo kun la nomo "Guelma", kun sama signifo. Dum tiu unua jarcento ne pli ol 40 aŭ 50 homoj loĝis en Huelma. Kiam la Al-andalusa kaliflando malaperis, Huelma restis sub la posedo de la granada regnolando.

La landlimo inter la kristanaj regnoj kaj la regnolando Granada dum la 13-a jarcento kuŝis tuj apud la vilaĝo Huelma. Tiel, en la jaro 1245 la kastilia reĝo Ferdinando kaj la granada Alhamar subskribis la traktaton de Jaeno, difinanta landlimojn inter ambaŭ regnoj. Tiam, Huelma estis la plej norda punkto de la granada regno-lando. Fine, en la jaro 1438, la kastilia armeo konkeris la vilaĝon, kiu estis poste donacita de la reĝo al la nobela familio Alburquerque. Post la kristanigo de Huelma la ĉefa moskeo fariĝis preĝejo dank'al la laboroj de la konata renesanca arkitekto Andrés de Vandelvira, li venigis de Jaeno la novajn sonorilojn de la preĝejo.

En la 19-a jarcento, kiam la napoleona armeo invadis Hispanion, Huelma fariĝis unu el la ĉefaj lokoj de la agado de gerilanoj kontraŭ la franca



Blazono de Huelma

invandantaro. Fine de tiu jarcento, oni kalkulis 800 enloĝantojn en la urbo, kies domoj havis kortojn kaj hortojn.

Dum la 20-a jarcento, centoj da Huelmanoj, kiel en ĉiuj andaluziaj vilaĝoj, migris en industriajn regionojn de Hispanio, ĉefe en la nordo, ankaŭ en eŭropajn landojn, kiel Francio, Svisio kaj Germanio.

Nuntempe, Huelma estas belega vilaĝo, kun 5500 enloĝantoj, kies ekonomio baziĝas, krom ter-kulturado, sur fabrikado de mebloj kaj viando-produktado. Lastatempe, fariĝis tre grava la kampara turismo.

Monumentoj

Kastelo de Huelma

Starigita en la 16-a jarcento sur la restaĵoj de alia fortreso konstruita dum la islama regado de la vilaĝo. Ĝi apartenis al duko de Alburquerque, kiu ricevis la urbon post la kastilia konkero. La stilo de la konstruaĵo estas renesanca, kun kvadrata bazo kaj 4 turoj ĉiuflanke.

Preĝejo *Inmaculada Concepción*

Ekstarigita meze de la 16-a jarcento sur restaĵoj de praa islama moskeo. Kvankam la arkitekto sekvis renesancan modelon, esence ĝi ne similas al tipaj preĝejoj, sed al palaco. En la jaro 1616 oni konstruis turon apud la preĝejo, kvankam verdire la dimensioj de la turo ne estas proporciaj al tiu de la preĝejo.



Trezorejo "*El Pajarillo*"

Kiel dirite, la unuaj enloĝantoj de Huelma estis iberoj. El tiu civilizacio restas kelkaj figuroj, nuntempe ekspoziciitaj ĉe la Ibera Muzeo de Jaeno. Tiuj figuroj estis trovitaj en



loko konata kiel *El Pajarillo*. Tie troviĝas nun centro por montri la iberan kulturon en Huelma.



Figuro de lupo de la iberana kulturo, trovita en Huelma.

Festoj

Karnavalo estas partopreninda festo en Huelma. Organizata de post la jaro 1989 ĝi okazas ĉefe sur-strate.

La unua semajn-fino de la monato majo okazas pilgrimado de la Virgulino de la Fuensanta kaj Sankta Lucia kun partopreno de kelkaj ornamitaj kaleŝoj.

La ĉefaj festoj okazas en la monato aŭgusto, en la kermeso de Sankta Agusteno, samtempe okazas foiro "ExpoHuelma" kun la partopreno de multaj bruto-farmistoj de la tuta regiono.

Gastronomio

La *migas serranas* estas unu el la plej konataj kaj bongustaj pladoj en Huelma. Temas pri modesta sed gustuminda manĝaĵo farita el panero, kaj oliv-oleo, tre bone akompanita de porkaĵo kaj kapsiko.

Por reakiri fortojn estas necese gustumi la faban kuiradon, ellaborita de faboj, terpomoj, cepo, ajlo kaj iomete da porkaĵo.

Por akompani kafon aŭ dolĉan vinon taŭgas la frititaj ringo-panoj de Huelma, ellaborita per faruno, ovo, sukero kaj anizo. Frititaj ene de oliv-oleo kaj pulvoro disŝutita per sukero.

Venontnumere Turismi en...

Barbate (Kadizo)



Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

Antaŭ cent jaroj en Kordovo

En la monato majo de 1925 okazis en Kordovo la 5-a Hispana Kongreso de Esperanto. Temis pri la unua internacia E-renkontiĝo organizita en Andaluzio. Unue, estas necese klarigi, ke sur kelkaj raportoj ĉi tiu kongreso aperas kiel 3-a Iberia Kongreso, kaj sur aliaj kiel 5-a Hispana Kongreso. Jen la kialo: en la jaro 1920 oni projektis kaj efektivigis la tiel nomata "Unuan Diskutan Kunvenon de Esperantistoj de Iberiaj Landoj" en Barcelono, do, oni ne uzis ankoraŭ la nomon "hispana kongreso". Al tiu renkontiĝo de Barcelono sekvis en Zaragozo en la jaro 1921 la Dua Diskuta Kunveno.

Posta kongreso okazis en 1923 en Valencio, tiam oni anstataŭis la nomon "Diskuta Kunveno" per "Iberia Kongreso de Esperanto", do tiu de Valencio estis la 1-a Iberia Kongreso. En 1924 la 2-a kongreso okazis en Bilbao kaj en 1925 la 3-a Iberia Kongreso de Esperanto estis organizita de la kordova esperantistaro. Post kelkaj jaroj, kaj kun la celo agnoski kiel hispanajn kongresojn tiujn du unuajn "diskutajn kunvenojn", tiuj renkontiĝoj rekalkuliĝis. Tiel, la 3-a Iberia Kongreso de Esperanto estis agnoskata kiel la 5-a Hispana Kongreso de Esperanto.



La kongreso okazis de la 10-a ĝis la 12-a de majo ĉe la prestiĝa kultura rondo "Círculo de la Amistad", ĉe la centra kvartalo de la urbo. Aliĝis al la kunveno 107 homoj kaj asocioj el 6 landoj, el kiuj reale ĉeestis kvindeko, inter ili brito, belgo, ĉeĥo kaj franco. La ĉefa organizanto estis la municipa arkitekto Francisco Azorín, kvankam oni devas elstari ankaŭ la laborojn plenumitajn de Francisco Serrano Olmo, Pantaleón Marivela, Joseph Berger, Paul Linares kaj Rogelio Luque.

Rilate debatojn dum la kongreso, la ĉefa diskuto temis pri la formo de esperantista organizado en Hispanio, ĉu kiel konfederacio iberia, propozita de ekster-madridaj nordaj grupoj, aŭ de hispana centra asocio, laŭ propono de la madrida esperantisto Julio Mangada. Fine estis aprobita la organizado ĉirkaŭ Hispana Esperanto-Asocio.

Alia grava rezulto dum la kongreso en Kordovo estis la konsidero de la internacia lingvo Esperanto, fare de la



Geesperantistoj en la korto de la kongresejo "Círculo de la Amistad" en Kordovo.

La rolo ludita dum la kongreso de la kordova arkitekto estis gravega, tamen estas necese diri, ke dum la inaŭgurado de la renkontiĝo, farita de la municipaj kaj provincaj aŭtoritatuloj, li restis marĝene, ĉefe pro sia konata socialisma idealaro, kiu tute ne kongruis kun la tiutempaj aŭtoritatuloj de la diktatura registaro de la generalo Primo de Rivera.

poŝta servo kiel "lingvo klara" en telegrafio. Kion signifas ĉi tio? Nu, sciate, ke kiam oni sendas telegramon estas necese pagi prezon po vorto. Tamen, se temas pri lingvo ne akceptata, tio estas "lingvo ne-klara", la kosto ne estas po vorto, sed po litero. Tiel, ĝis la jaro 1925 en Hispanio se oni deziris sendi telegramon en esperanto 25 estis necese pago po ĉiu litero sendita.

Post la kordova kongreso oni atingis la konsideron de Esperanto kiel "lingvon klaran" por sendi telegramojn. Nune, kiam la telegrama servo apenaŭ estas uzata eble ĉi tiu atingo ne estas grava, tamen tiuepoke telegramoj estis ege uzataj en la komunikado, do la akcepto de nia lingvo estis granda sukceso.

La kongresanoj ankaŭ havis la eblon viziti mirindaĵon en la kordova montaro. Tiun lokon ili atingis per autobuso. Temis pri la "Bieno de la Arkoj", surdekliva bieno kiu posedas grandan ĝardenon kun fontanoj. Ankaŭ tie troviĝas groto, tie antaŭ multaj jaroj loĝis piulo vivanta en soleco.



Ekskurso de kongresanoj en la kordovan montaron

Tre riĉa ankaŭ estis la turisma branĉo de la kongreso. Francisko Azorín gvidis turisman viziton en la moskeon kaj en la judan kvartalon de la urbo. Kongresanoj vizitis la Provincan Muzeon de Belaj Artoj, tie ili estis ricevataj de la direktoro Enrique Romero de Torres, frato de la fama kordova pentristo Julio Romero.

Tamen, la plej grava ekskurso okazis en alian urbon. Temis pri unu-taga vojaĝo al la urbo Sevilo. Tieaj esperantistoj atendis la kongresanojn ĉe la stacidomo. Krom vizitindaj lokoj en la urbo, la kongresanoj povis vidi kelkajn paviljonojn ĵuse konstruitaj por la Ibero-amerika Ekspozicio, kiu okazus post kelkaj jaroj, ĝuste en la jaro 1929.


Resume, antaŭ 100 jaroj okazis en Kordovo esperantista kongreso. Unuafoje venis en Andaluzion amaso da esperanto-parolantoj, inter ili kaj eĉ en sufiĉe granda nombro, multaj el ili estis eksterlandanoj.

Al tiu unua renkontiĝo aliaj sekvis, kelkaj jaroj poste, en 1928, okazis alia hispana kongreso en Sevilo kaj de tiam la historio de nia lingvo en Andaluzio ne haltiĝis.



Humuro





$E = mc^2$ *Scienca Angulo*

La teorio de la infinitaj tajpantaj simioj

En la jaro 1913, la franca matematikisto Émile Borel, kiu estis membro de Amikaro Esperantista de Lyon kaj honora membro de la Universala Esperanto-Asocio, skribis en sia artikolo "La Mécanique statique et l'irréversibilité", ke se miliono da simioj tajpus sen-interrompe dum 10 horoj estus tre malfacile atingi tekston similan al kiu ajn libro tiam ekzistanta.

En la jaro 1970 oni reformulis ĉi tiun teorion, tamen oni ne parolis pri difinita nombro da simioj kaj pri konkreta tempo. Male, oni menciis senliman nombron da simioj dum infinita tempo. Tial, ĉu kun ĉi tiuj kondiĉoj oni povus atingi iam tekston legeblan kaj eĉ similan al kelka grava literatura verko jam ekzistanta? Jen la teorio de la infinitaj tajpantaj simioj.

Ni pristudu ĉi tiun aferon el la statistika vidpunkto. Tiel, se du okazintaĵoj estas tute sendependaj unu de la alia, la ŝanco realigi ambaŭ egalas al la proporcio de unu el la okazintaĵoj multiplikite per la alia. Do, se simio sidiĝas antaŭ tajpilo kun 20 klavoj, la ebleco premi la klavon

de la litero E egalas al $1/20$; sekve la ebleco premi E kaj poste S egalas al $1/20^2$. Fine, por skribi senerare unuafoje la vorton ESPERANTO, la ŝanco estus $1/20^9$



Émile Borel
1871 ~ 1956

Inverse, la ŝancoj tajpi vorton malsimilan al ESPERANTO, vorto komprenebla aŭ simpla kunmeto de naŭ literoj, egalas al $1-1/20^9$, tio estas 0,999999999998, konsiderante, ke 1 egalas al skribado de vorto malsimila al ESPERANTO kaj 0 la tajpado de tiu vorto. Kompreneble la ŝancoj skribi ESPERANTO en la unua tajpado estas minimumegaj.

Tamen, la afero ŝanĝiĝas se ni tajpas kaj retajpas vortojn kaj pliajn vortojn. Tiel, la ŝancoj tajpi iufoje la naŭliteran vorton ESPERANTO egalas al:

$$X = (1/20^9)^N$$

X = ŝancoj tajpi ESPERANTO

N = pruvoj tajpi naŭliteran vorton.

Se N egalas al 1.000.000, la ŝancoj skribi iufoje la vorton ESPERANTO egalas al 0,000000195%; tamen se $N = 100.000.000.000$, la ŝancoj tajpi la nomon de nia lingvo egalas al 0,195%. Ĉi tio signifas, ke se N kreskas, la ŝancoj tajpi iam ESPERANTO pliiĝas. Do, se N egalas al infinito, la ŝanco tajpi iam tiun vorton estas senduba.

Nu, simple anstataŭigu la vorton ESPERANTO per la skribado de teksto de fama verko, ekzemple "Don Kihoto". Tiel, oni povas aserti, ke se senlima (infinita) nombro da simioj tajpas freneze tajpilon dum infinita tempo iufoje iu el ili skribos verkon similan al kiu ajn ekzistanta libro.

Se paroli pri la efektiva realigado de ĉi tiu propono, oni devas diri, ke en la jaro 2003 oni ekfunkciigis komputilan programon kiu aperigis hazarde literon ĉe ekrano, ĉi-kaze programo similis esti simio tajpanta. Nu, post du jaroj da seninterompa funkciado, oni atingis tekston kun 24 sinsekvaj literoj similaj al fragmento de Ŝekspira verko, kelkaj jaroj poste eĉ oni atingis 30 sinsekvajn literojn de alia verkaĵo de la brita aŭtoro. Tamen, oni devas averti, ke la teorio de la senlimaj tajpantaj simioj parolas pri infinita tempo, do ne pri dudeko aŭ trideko da jaroj.

Kun pli da bonhumuro, alia eksperimento realiĝis en la jaro 2003 fare de sciencistoj de la universitato de Plymouth en Britio, kunlabore kun la zoologia parko de Paignton. Tiam oni lasis komputilojn kun klavaro ene de 6 kaĝoj por simioj. La plej legebla teksto verkita de la simioj estis 5-paĝa ripetado de la litero S. Tamen la eksperimento finiĝis kiam simioj urinis kaj fekis sur la komputiloj.

Por fini, ni proponas al vi ludon kiu povus esti enkadrigita ene de la teorio de la senlimaj tajpantaj simioj. Kiel vi eble scias la neracionala nombro Pi havas senlimaj (do, infinitaj) ciferoj post la komo, tiel 3'141592..... Do, se ili estas senlimaj, ĉu estus eble trovi kian ajn sinsekvo da ciferoj inter tiuj decimaloj? Provu vi mem, ekzemple tajpante vian Nacian Identig-Karton, sendube ĝi troveblas ene de la decimaloj de Pi. Faru tion ĉe la TTT-paĝo <https://www.subidiom.com/pi/pi.asp> (anglalingva ret-situo)





Flamenko

Antonio Núñez Montoya ***"El Chocolate"***

Antonio de la Santísima Trinidad Núñez Montoya, konata ĉe flamenkaj rondoj kiel *"El Chocolate"*, naskiĝis en la jaro 1930 en la urbo Jerezo. Liaj gepatroj estis amatoraj flamenkaj ciganaj kantantoj, do flamenkan arton li spiris ĉiutage ĉe si. Kiam li estis apenaŭ 6-jaraĝa, la familio translokiĝis en Sevilon.

En la andaluzia ĉefurbo, dum la jaroj 30aj kaj 40aj, disvolviĝis impona flamenka etoso en trinkejoj de la kvartalo La Alameda. Tie kantis Pepe Pinto, Niño Gloria, Manolo Caracol, Pastora Pavón kaj aliaj. Tiuj rondoj estis ofte vizitataj de la juna Antonio Núñez kaj tie li modlis sian propran kant-stilon.

Kiel profesia kantisto li ludis unuafoje en la nord-afrika urbo Melilo kaj poste, ene de ĉiutaga spektaklo, en kazino de Sevilo. De tie li iris en Madridon, li poste eĉ partoprenis en flamenkaj spektakloj eksterlande, ĉefe en Eŭropo kaj Japanio.

Flamenko-kritikistoj asertas ke Antonio Núñez "El Chocolate" estis unu el la plej ortodoksaj flamenkaj kantistoj en la 20-a jarcento. Lia stilo,



Antonio Núñez Montoya "El Chocolate"
1930 ~ 2005

tute pura kaj sen modernaj influoj, estas konata kiel "nigraj sonoj", tiuj kiu eliras en la plej antikvaj ciganaj flamenkaj etosoj de pasintaj jardekoj. Li kantis lerte *soleás*, *seguriyas* kaj fandangoj.

En la jaro 2001 Antonio Núñez "El Chocolate" ricevis gravan premion, tiam oni diris, ke li estas granda defendanto de la pura flamenko kaj de la cigana kantado. En 2002 li atingis *Grammy*-premion al la plej bona flamenka kreaĵo pro sia disko *"Mis Sesenta Años con el Cante"* (Miaj

sesdek jaroj kun la kantado). En la jaro 2003 li ricevis la medalon de Andaluzio, honoro de la Andaluzia Registaro. *El Chocolate* forpasis en Sevilo en la jaro 2005.

Jen fandangoj de Antonio Núñez "*El Chocolate*", kiujn vi povos aŭskulti en la jena jutuba ret-situo:

https://www.youtube.com/watch?v=8I_R-Gkprx0

*Ne demetu la botelon,
ebriĝi volas mi.*

*Lasu ĉi tie la botelon,
mi volas eltrinki ĝin.*

Tiel, mi ne pensos pri ŝi.

Mia Dio, mi forgesu ŝin.

*"Vi brakumu min",
ebria ŝi tion al mi petis.*

*"Vi brakumu min",
tion petis ĉiesulin',
ĉe miaj brakoj kiel infanin',
ŝi tuj dormis en mia sin'.*



Esperanto, ponto inter popoloj



Ponto de La Barqueta, konstruita okaze de la Universala Ekspozicio de Sevilo ~ 1992



Fervojista Angulo

La Stacidomo en la Placo Armas en Sevilo

fervojista@esperanto.ac

<https://hafe-19.websself.net>

En la unuaj jaroj de fervojoj en Hispanio ĉiu kompanio konstruis siajn proprajn stacidomojn. Ĉi tio ne okazis nur tra la linio mem, sed ankaŭ se paroli pri la komenco kaj la fino de ĉiu linio. Tiel, se en urbo funkciis kelkaj fervojaj kompanioj, povus ekzisti ne nur unu sola stacidomo. Ekzemple, tio okazis en la urbo Sevilo.

En la jaro 1859 stariĝis provizora stacidomo en la konata kiel Placo de Armas. Tia kompanio konstruis fervojan linion kun la celo komuniki Sevilon kun la urboj Lora del Río kaj Kordovo. Alia kompanio konstruis alian linion por komuniki la andaluzian ĉefurbon kun Jerezo kaj Kadizo, do nova stacidomo stariĝis ĉe la kvartalo Sankta Bernardo.

La fervoja kompanio MZA deziris konstrui grandan stacidomon por anstataŭigi tiun provizoran ĉe Placo de Armas. Tamen, la hispana registaro, unuamomente, ne akceptis tiun proponon, pro la fakto ke oni celis disponi pri ununura stacidomo en Sevilo. Sed fine tiuj du fervojaj kompanioj agantaj en Sevilo ne venis en akordon, do MZA fine stariĝis sian propran kaj imponan stacidomon en tiu sama loko: la Placo de Armas.

La portugala inĝeniero José Santos Silva redaktis la unuan projekton por la konstruado de la stacidomo. Laŭ li mem skribis, li baziĝis sian dezajnon sur la korto de *Arrayanes* de la Alhambro de Granado kaj sur la moskeo de la maroka urbo Tanĝero.



Ene de la stacidomo oni konstruis tri kajojn, kelkajn salonojn agantaj nkiel atendejojn, telegraf-oficejon, bagaĵo-deponejon kaj doganon. Ĉio kovrita per metala plafono, simile al kelkaj paviljonoj dum la Universala Ekspozicio de Parizo en la jaro 1889. La konstruado, finita en la jaro 1901, estis impona en tiu epoko, ĝi estis 105 metrojn longa, 30 larĝa kaj 20 alta.



La skemo de la reloj estis labirinta. La ĉefa linio estis tiu de Madrido, tamen ekzistis konektoj kun la linio Sevilo-Onubo kaj eĉ kun alia komunikanta la ŝarĝad-kajon de la kvartalo *San Jerónimo*. Ĉiuj vagonaraj movoj restis sub la kontrolo de staciestro, kiu lokiĝis ĉe budo je 6 metroj alte.

Vagonaroj kiuj komencis aŭ finis sian vojon en Sevilo estis konataj kun popularaj nomoj, tiel, "La kataluno" eliranta el Sevilo je la 16:20 horoj, ĝi atingis Barcelonon je la 12:10, tio estas preskaŭ 20-hora vojaĝo. Tiu konata ki

konata kiel "La Ekspreso" iris en Madridon, kaj "La Ferobus" komunikis Sevilon kun la urbo Kordovo. Alia norda linio konata kiel "La Arĝenta Vojo" eliris el Sevilo je la 07:10 horoj kaj finis en Ĥihon' (Asturio) je la 23:18. Trajnoj irantaj aŭ elirantaj el ĉi tiu stacidomo aperigis sur siaj afiŝoj la nomon "Sevilla PA" (Sevilo Placo Armas).



La stacidomo en la 70-aj jaroj

Se paroli pri akcidentoj, la plej grava okazis la 22-an de julio de 1978. Tiam, elektra trajno al Kordovo ekigis sian manovron por akcepti pasaĝerojn. La vagonaro marŝis malrapide, tamen la lokomotivo ne haltiĝis ĝusta-loke kaj ĝi preterpasis la bufro-blokon. Fine ĝi koliziis kontraŭ la fasado de la stacidomo. Ĉi tiu akcidento kaŭzis unu viktimon kaj du vunditojn. El la stacidomo de la Placo Armas en Sevilo eliris la lasta vagonaro la 29-an de septembro 1990. Tiam, sur alia kvartalo de la urbo Sevilo, oni konstruis novan stacidomon, Sankta Justa, kun la celo utili dum la Universala Ekspozicio de 1992.

La milionjara pikniko


Panjo sugestis, ke tiu povus esti taŭga tago por fari ekskurson kaj fiŝkapti. Tuj ĉiuj, plenĝoje, ekkriis kaj kiel eble plej rapide ĉio necesa estis enpakigita en kestegoj. Panjo enmetis bluzojn kaj sveterojn, Paĉjo prenis sian pipon, li atente rigardis la marsan ĉielon. La tri knaboj, bruege, enŝipiĝis en la motorboaton.

Hura!

Piknika tago!

Atentu Mikael'!

Ek Tomas'!



Severin kaj Elder

Laŭ novelo de
RAY BRADBURY

Paĉjo funkciigis la startilon. La motorboato elsendis sonon ĝis la ĉielon. La akvo kirliĝis kaj kiam la boato subite ekmarŝis antaŭen. Mark' sidiĝis apud sia patro. Paĉjo montris strangan rigardon dum la boato ascendis tra la kanalo.

Ĉu ni iros tre fore, Paĉjo?

Unu milionon da jaroj!

Ĉu?

Jes!!



Panjo atentigis ilin pri lontana loko...

Rigardu, knaboj! Tie estas mortinta urbo.

Nu!

Ja!



Tie, antaŭ ili, kuŝis mortinta urbo, kiel dormanta meze de varma somero en Marso. Kaj paĉjo ŝajnis kontenta, ĉar la urbo estis mortinta.

Tiu urbo estis dezerta etendaĵo da rozaj rokoj dormantaj sur sabla monteto. Ĝi kuŝis tra tri mejloj. Ekstere de ĝi, stariĝis duon-detruitaj pilieroj kaj frakasitaj kajoj. Fone, sanktejo sen figuroj kaj post ĝi sabla etendaĵo tra multaj mejloj.

Mi vidas neniun marsanon !

Ĉu ne estas marsanoj?

Jes, Mark. Ili ekzistas.



Paĉjo rigardis tiun jam lontan punkton en la spaco. Rigardante tien, ne estis eble vidi la militon. Oni ne vidis luktojn de unuj kontraŭ aliaj, nek elverŝitan sangon.

Paĉjo, kion vi serĉas?

Mi serĉas teran logikon, komunan saĝon, bonan registaron, pacon, respondeccon...



Ĝuste tiam, spaca raketo leviĝis en la aeron... kiel ŝtono jetita mezen de blua baseno, pli kaj pli altan. Fine, ĝi malaperis en la spaco.

Rigardu, paĉjo!

Ĉu tiu raketo iras en la Teron, paĉjo?

Jes, kara.



Paĉjo surpriziĝis kiam li vidis la raketon. Li kunpremis siajn dentojn kaj li akcelis la boaton. Tiu raketo estis la lasta vojaĝanta en la Teron.

Uhhh, uhhh

Tamen, mi niam trovis ĉi tion. Verŝajne tiuj ideoj niam realiĝis, aŭ ni estis trompitaj kiam ni pensis ke tiuj ideoj estis eblaj.

Rigardu tiun fiŝon!



Panjo interrompis kaj ŝi fingre montris fiŝon. La kuriozemaĵ kaj abate rigardis kaj la tuta boato balanciĝis.



Arĝentkolora fiŝo ondume naĝis apud ili. Ĝi avide manĝis kelkajn pecetojn da manĝaĵoj.

Ĝuste kiel milito!



Paĉjo rigardis ĝin. Lia voĉo eliris profunda kaj trankvila.

La milito antaŭeniras, ĝi vidas nutraĵon, ĝi ondumas kaj iom poste la Tero malaperas.




Ili restis senmovaj ene de la boato. Sub ili, la akvo de la kanalo fluis pura, rapida kaj freŝa. Tra la kanalo ambaŭflanke, troviĝis grandaj arbustoj, plantitaj de teraj sciencistoj antaŭ kvindeko da jaroj. Dank' al ĉi tiuj abundaj plantoj nun Marso disponis pri tavolo atmosfera.

Kiam ni vidos la marsanojn, paĉjo? Balsaŭ kara, tre balsaŭ. Eble ĉi-vespere, eble ĉi-nokte!



Ne mensogu, Bill! Marsanoj estas tute estingitaj. Ne trompu la infanojn!

Ho, tute ne! Mi montrós marsanojn al vi tre balsaŭ.



Mark' kunŝovis sian brovon, tamen li diris nenion. Ofte estis malfacile kompreni plenaĝulojn. 18-jaraĝa Mikael' daŭrigis la temon...

Kiaj ili estas? La marsanoj Vi scios tion, kiam vi vidos ilin.



Mark' surpriziĝis. Ĉu vere temis pri ekskurso nur por fiŝkapti? Do, kial ene de la boato paĉjo enmetis pafilon? Kaj kial tiom da manĝaĵoj. Kun la nutraĵoj havigitaj de panjo ili povus vivi dum deko da jaroj! Ĉu vere temis nur pri ekskurso? Krome, kial gepatroj havis tiel seriozajn vizaĝojn? Neniu sur la boato ridetis.

Mi ankoraŭ ne vidis la marsanojn



Paĉjo ankaŭ alportis atomenergian radion. Ĝi funkciis laŭ olda tekniko. Estis eble aŭdi muzikon aŭ paroladojn nur se ĝi troviĝis tuj apud la oreloj. Li aŭskultis ĝin nun

Lia vizaĝo tre similis al tiu marsa urbo, disfalita, elĉerpita. Li donis la radion al panjo. Ŝi aŭskultis ĝin, tuj ŝiaj lipoj malfermiĝis.

Ĉu ĉio enorde? Paĉjo? Panjo?



Mark' scivoleme rigardis siajn gepatrojn. Paĉjo preskaŭ ekploris.

Ĉio finiĝis. La radio elstatiĝis. Ĉiuj radio-stacioj sur la Tero malaperis. La aero estas tute silenta. Ĉio restos en silento.





Kaj dum kiom da tempo?

Versajne, viaj genepoj povos aŭskulti ilin denove.



Tiam, paĉjo sidiĝis kaj la knaboj, konfuz-plenaj, restis ĉirkaŭ li. Fine, li diris...

Mikael', elektu urbon! Kiun ajn el la urboj jam trapasitaj.

Nu, paĉjo, kiun urbon?




Elektu kiun ajn urbon. Kiun ajn, laŭ via prefero. Ek! Mark', Tom, helpu elekti urbon!

Mi elektas urbon kun marsanoj ene!



Kun marsanoj ene! Mi promesas tion.

Paĉjo alparolis la knabojn, sed li rigardis panjon.



Ili pasis tra 6 urboj en 20 minutoj. Mikael' ŝatis la unuan, tamen liaj fratoj rifuzis tiun elekton. Poste, ili trapasis pliajn urbojn, sed ili plaĉis al neniu knabo. Fine, la sesa urbo estis aprobata de ĉiuj. Ĝi estis tre malgranda, sed unuavide pli gastema.

Ĉi tiu urbo!

Jes!

Bonege!

Rigardu!

Jes, Alico, jen la urbo.



Post haltigi la boaton, paĉjo saltis sur teron.

Jen ni karaj! Jen la urbo, kie ni loĝos ekde nun.

Paĉjo, ĉu ni loĝos ĉi tie por ĉiam. Kaj la raketo en la Teron? Kiam ni revenos tien?



Paĉjo metis la atoman radion tuj apud la orelo de Mikael'.

Aŭskultu Mikael'!

Nenion! Mi aŭskultas nenion!



Paĉjo kap-jesis.

Jes, nenio! Karaj, nenio pli! Neniu raketo, neniu hejmo, eĉ neniu Tero.

Mikael' pripensis la ĵusan eldiraĵon de sia patro. Tiam, kelkaj larmoj ekaperis

Atentu kara! Kontraŭe vi disponos pri tuta planedo por vi!


Kion?



Paĉjo levis sian brakon, li montris kelkajn konstruaĵojn, ankoraŭ staraj ĉe la urbo de ili elektita.

Mi donacas al vi ĉi tiun urbon. Ĝi apartenas al vi ĉiuj. Mikael', Mark', Tomas, jen via nova urbo. Nur por vi.

Ĉu vere nia? Ĉu vi aŭdis tion? Ni havos nian propran urbon. Nur por ni.



Ili tuj eniris en la roz-koloran ŝtonan urbon. Ili murmuris, kvankam ili estis la solaj enloĝantoj tie.

Ralf' ankaŭ venos baldaŭ ĉi tien kun siaj kvar filinoj.


Kvar filinoj! Inoj, ba!



Jen ili sur monteto. Ili regus ĉiujn terojn de ili viditajn, kiel ne-kontraŭdireblaj reĝoj.

Paĉjo, ĉu ĉio al ni apartenas?

Karaj! La tuta planedo apartenas al ni. La tuta planedo!



Jen ili, komprenante kion signifis esti la posedanto de la tuta planedo, de granda kaj soleca planedo.

Nokto venis baldaŭ en tiu maldika atmosfero. Paĉjo iris en la boaton, li revenis kun granda kvanto da paperoj en siaj manoj.



Paĉjo stakigis la paperojn meze de detruita korto. Li ekbruligis la stakon, tiel ili povus varmiĝi. Ĉiuj ridis, la paperoj abrupte saltis kiam flamoj ekŭsis ilin.



Bank-biletoj, sennomaj akcioj, mapoj, milit-informoj, religiaj bultenoj... Paĉjo sidiĝis kaj li ekbruligis ilin.

Mi bruligos nian pasintan vivmanieron, same kiel nun tiu vivmaniero brule konsumiĝas en la Tero.



Pardonu min, se mi parolas kiel politikisto. Tamen, tio mi estas, mi estas eksguberniestro de ŝtato. Mi estis honesta kaj mi estis malamata pro tio. Vivo sur la Tero ŝajnis esti misorientita. Scienco iris tro fore kaj tro rapide, pro tio la popolo perdiĝis ĉe scienca dezerto, kiel infanoj ĉiutage kun novaj ludiloj. Ili atentis maŝinojn, sed ne por kio utilis tiuj maŝinoj.



Milito fariĝis pli kaj pli akraj. Tiu estis la signifo de la silenta radio. Ni fuĝis de tiu danĝero, mi estis tute certa, ke la milito baldaŭ okazus. Mi esperis, ke ĝi ne estus tiel terura, tamen la Tero nun malaperis. Interplanedaj vojaĝoj nun ne eblas, espereble ni povos post 200 jaroj aŭ eble pli.



Vivo sekvis eraran vojon kaj ĝi mem strangoliĝis per siaj propraj manoj. Vi estas junaj, pro tio mi ripetos ĉi ĉion fojon post fojo, ĝis kiam vi bone komprenos.



Paĉjo ekbruligis pliajn paperojn.

Nun ni estas solaj. Ni kaj aro da homoj, kiujn ni renkontos post kelkaj tagoj. Ni estas sufiĉaj por komenci denove. Sufiĉaj por ekigi ĉion. Sufiĉaj por venki la haŭson kaj ekiri tra nova vojo.



Fajro leviĝis en la aeron dum la parolado de paĉjo. Tiam, ĉiuj paperoj konsumiĝis, ĉiuj escepte unu. Tio ŝajnis simbolo. Ĉiuj leĝoj kaj kredoj de la Tero bruliĝis, restis nur cindroj inkandeskaj.



Mark' rigardis la lastan paperon ĵetitan de paĉjo. Temis pri mapo kie aperis ĉiuj landoj de la Tero.



La papero forkonsumiĝis, ĝi malaperis kiel varmega nigra papilio.

Mark' ne volis vidi tion. Li glutis salivon. Paĉjo stariĝis.

Nu, venu, venu ĉiuj! Alico venu ankaŭ vi! Mi nun montros al vi la marsanojn.



Mark' ploris laŭte, paĉjo prenis lin kaj kune ĉiuj iris tra la ruinaĵoj de la marsa urbo ĝis la river-kanalo.



Tiu kanalo, tra kie morgaŭ alvenos kun siaj gepatroj la futuraj edzinoj de la knaboj... ankoraŭ junaj knabinoj.

Nokto faliĝis ĉirkaŭ ili. La steloj ekaperis. Mikael' serĉis la Teron en la spaco. Li ne trovis ĝin.



Estis eble pensi ke la Tero sin kaŝis.

Malvarma nokta vento blovis ĉirkaŭ ili. Tiam, paĉjo diris...

Via patrino kaj mi instruos vin. Eble ni ne sukcesos, tamen ni havas sufiĉajn spertojn. Ni planis jenan vojaĝon antaŭ multaj jaroj, vi ankoraŭ ne naskiĝis. Eĉ sen militoj ni decidis veni en Marson kaj vivi ĉi tie laŭ nia propra maniero. Tio okazis post la forviŝo de la marsa civilizacio fare de la teranoj.



Ĉiuj ili alvenis en la kanalon. Ĝia akvo estis freŝa, ĝi reflektis la noktajn astrojn.

Mi ĉiam deziris vidi marsanon, paĉjo. Kie ili estas? Vi tion promesis.

Ili estas ĉi tie. Mikael'.




Paĉjo fingre montris suben. La marsanoj estis tie, ja!



La marsanoj estis tie, ene de la kanalo, sur la reflekto de la akvo. Mikael', Mark', Tom, Paĉjo kaj Panjo. Tiuj marsanoj rigardis ilin intense de la ondumanta akvo dum longa longa silento.

nun ni

junularaj paĝoj



ajeu@esperanto.ac



TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) okazigos la 82an Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Tiana, vilaĝeto apud Barcelono, de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026. Tiana troviĝas en la kataluna regioneto Maresme, meze de la naturparko Serralada de Marina, tie estas la kongresejo de IJK: la gastejo La Conreria.



TEJO (Organización Juvenil Mundial Esperantista) celebrará el 82º Congreso Juvenil Internacional (IJK) en Tiana, una pequeña población junto a Barcelona, del 9 al 16 de agosto de 2026. Tiana se encuentra en la comarca catalana de Maresme, en medio del parque natural Serralada de Marina, allí está el lugar donde se celebrará el congreso: el albergue La Conreria.



Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo - AJEU



La Conrería disponigos al la partoprenantoj de IJK larĝajn eksterajn spacojn, naĝejon, teatrejon, sportejon, belajn vidaĵojn de la Mediteraneo kaj naturan ĉirkaŭaĵon en kiu eblos promeni. Proksime al Tiana troviĝas ĉemaraj vilaĝoj kaj urboj kiel Montgat, Mataró aŭ Badalona, kaj 10 kilometrojn sude etendiĝas Barcelono.

IJK 2026 estos speciala ankaŭ pro unika sperto kiun ĝi proponos al ni: la 12-an de aŭgusto vespere oni povos spekti plenan suneklipson, kiu videblos preskaŭ nur en Iberio.



La Correría pondrá a disposición de los participantes en la IJK amplios espacios exteriores, piscinas, escenarios teatrales, espacios deportivos, unas bellas vistas al Mediterráneo y unos alrededores naturales en los que será posible hacer senderismo. Próximo a Tiana se encuentran pueblos costeros y ciudades como Montgat, Mataró o Badalona, y a 10 kilómetros al sur se encuentra Barcelona.



La IJK 2026 será especial también por un espectáculo único que se nos presenta: el 12 de agosto por la tarde se podrá contemplar un eclipse solar completo, que será visible casi únicamente en la Península Ibérica.

Kaj nun jena demando: Ĉu estus eble organizi komunan vojaĝon aŭ partoprenon de la andaluzia esperanto-junularo al la venonta IJK ?

ajeu@esperanto.ac

ŜAKO

Gambitoj



La Dama Gambito estas usona televida miniserio de la jaro 2020, bazita sur la samnoma romano de Walter Tevis, verkita en la jaro 1983. La rakonto temas pri orfa ŝaka mirinfano, ŝia vojo al la pinto de la ŝakmondo kaj samtempe luktante kun emociaj problemoj kiel drogaĉ- kaj alkohol-dependenco.

Kiel dirite, ĉi tiu dramo rakontas la historion de ŝakludistino kaj la rilato kun ŝako jam aperas sur la titolo "La Dama Gambito", sed, kio estas gambito?

Gambito estas taktiko en komenca fazo de ŝakludo, per kiu oni ofertas pecon por akiri pli favoran situacion. Foje estas la nigra ludanto tiu kiu riskas aŭ ofertas pecon, ofte peono, esperante gajni tiun favoran pozicion. Ĉi tiu taktiko serĉas 3 celojn:

- gajni tempon.
- Eblici moviĝeblon.
- Malfortigi pozicion de kontraŭulo.

Se la alia ludanto ne akceptas la gambiton, tio estas, se oni ne kaptas la oferitan pecon, ni troviĝas antaŭ "rifuzita gambito".

Jen fama taktiko kiuj baziĝas sur gambitoj.


GAMBITO EVANS.

Temas pri gambito proponita de la blanka ludanto. Ĝi estas tre danĝera por la nigraj pecoj, kvankam se ludanto konas ĉi tiun taktikon li povas realigi taŭgan respondon. Pere de la gambito Evans oni ofertas peconon b4 por altiri la atenton de la nigra kuriero. Post movi peconon en c3 blankoj ĝuas tre fortan pozicion en la centro de la ŝak-tabulo, ĉefe se poste peono d4, tio faciligas la blankan atakon al la flanko de la nigra reĝo. Ni vidu:




Post jenaj movoj:


- 1.e4 e5
- 2.Ĉf3 Ĉc6
- 3.Kc4 Kc5
- 4.b4




Kiel oni povas vidi, blankoj oferas peonon sur b4 al nigra kuriero. La nigra peco povas kapti la blankan peonon sen-probleme, tiel 4... Kxb4. Se tiel, blankoj ludas 5.c3, tiam nigra kuriero devas fuĝi por ne esti kaptita. Se 5... Ka5 la nigra kuriero situas sin ĉe marĝena loko sen ia influo sur la centraj kvadratoj. Se 5... Kc5 movo de blanka peono ĝis 6.d4 provokos novan atakon al tiu nigra kuriero kiu devos denove fuĝi, male peonoj atingis pli grandan povon sur la centra parto de la tabulo. Tiel:



Nigraj pecoj akceptas la gambiton kaj la kuriero kaptas la blankan peonon b4.



Blanka peono antaŭeniras en c3, jen minaco por la nigra kuriero kiu devas fuĝi.



Per nova antaŭeniro de blanka peono ĝis d4 la nigra kuriero devas okupi senprofitan pozicion kaj blankoj regas la centron.

Do, pere de la ofero de nigra peono, tio estas gambito de peono b4, blankoj gajnis tempon, ja perdita de la nigra ludanto, ĉar li devis movi sian kurieron por eviti kapton. Same, blankoj formis bonan muregon de peonoj regantaj la centran parton de la tabulo ĉe c3, d4 kaj e4, apogitaj de ĉevalo sur f3 kaj kuriero sur c4. Fine, la pozicio de la nigroj malfortiĝis, tiel la nigra kuriero troviĝas sur postaj kvadratoj kaj ebla interŝanĝo de peonoj e5xd4 finiĝus kun pli forta pozicio de la blankoj post tiu interŝanĝo.



Andaluza Kuirarto

Ajoatao laŭ la jaena stilo

Ajlo estas kutima spico en la andaluza gastronomio. El la historia vidpunkto ĉi tiu planto, vere nur ties radiko, estis uzata ne nur kiel manĝaĵo, sed ankaŭ kiel kuracilo kaj eĉ kiel afrodiziigaĵo. Malgraŭ la fakto, ke multaj homoj rifuzas ĝin pro tiel intensa gusto, ajlo estas baza ingredienco en multaj receptoj en Andaluzio.

Hodiaŭ ni prezentas recepton de la provinco Jaeno, temas pri *ajoatao*. Ĝi estas kremo taŭga por akompani aliajn manĝaĵojn aŭ por esti prezentita kiel kanapo, se vi ŝatas intensajn gustojn.

Jen la ingrediencoj:

- Terpomoj, 250 gramoj.
- Ajlo.
- Salo.
- Ovo, nur flavo.
- Citrono, nur kelkaj gutoj.
- Oliv-oleo.



Terpomoj



Salo



Ajlo



Ovo-flavo



Oliv-oleo




Citrono

Jen la preparado:

1) Boligu 250 gramojn da terpomoj ene de sala akvo dum 30/40 minutoj. Ne senŝeligu la terpomojn, nur purigu ilin. Kompreneble la tempo bezonata dependas de la grandeco de la terpomoj. Per ĉi tiu boligo oni devas atingi malmolajn terpomojn facile tranĉeblaj per tranĉilo. Kiam terpomoj estos bruligitaj, malvarmigu kaj senŝeligu ilin.



2) Senŝeligu la ajlerojn (4 aŭ 5), pistu ilin kun iomete da salo ene de pistujo.



3) Ene de ĉi tiu pistujo, se ĝi estas granda, aŭ sur telero, metu tiun pistaĵon kaj la boligitaĵn terpomojn (sen-ŝeligitaĵn) . Denove pistu ĉion per ripetataj batetoj ĝis la atingo de pureo.



4) Aldonu la ovo-flavon kaj kelkajn citron-gutojn (aŭ vinagron). Denove pistu ĉion.



5) Verŝu la oliv-oleon per maldika flueto, samtempe pistu ĉion kun revoluo en la sama senco ĝis kiam ĉiuj ingrediencoj estos perfekte ligitaj. Gustumu kaj aldonu se necese plian salon.



6) Nun, malvarmigu la pistaĵon ene de fridujo dum kelke da tempo. Vi devos manĝi ĉi tiun recepton en la sama tago, aŭ en la sekvanta tago se ĝi estas konservita ene de fridujo. La *ajoatao* povas akompani viandon aŭ fiŝaĵon, tamen ĝi estas bongustega se oni ŝmiras paneton per *ajoatao*.





Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

"La karmezina koloro"

Benarrabá estas belega kaj kvieta vilaĝo en la Arunda montaro, ĉe la provinco Malago en Andaluzio. Tra ĝi sinuas la rivero Genal. En ĉi tiu vilaĝo oni rakontas antikvan historion, kiu parolas pri alkemio, tinkturado kaj kaŝitaj sekretoj.

Kiam preskaŭ la tuta Ibera Duoninsulo estis Al-andaluso, loĝis en Benarrabá la idaro de la islama tribo Banuh Rabbah. Unu el ili estis Abdelselam Ben Arrabat, li apartenis al korporacio de tinkturistoj. Tiutempe, la plej buntaj koloroj ornamis bel-fasonajn vestojn en la kortego de la kordova kalifo.

Oni diras, ke Abdelselam ne nur estis tinkturisto, li interesiĝis ankaŭ pri alkemio, eble pro tio, li ne ĉesis eksperimenti kun la celo trovi novajn tinkturojn kaj produktojn. Pro tio, li uzis sablon, ŝtonetojn, plantojn kaj insektojn, kiuj troviĝis ĉe la Arunda montaro. Li pistomiksis ĉion ene de potoj kun akvo de la rivero Genal.

Iam, li trovis insekton, iaspecan koĉon, kiu sekreciis vakson kaj enhavis ruĝan substancon, li estis



konata en Al-andaluso kiel "qarmaz". Ĉi tiu insekto abundis ĉe pinarboj kaj kverkoj de la apudaj montaroj. La tinkturisto pistis tiun ruĝan substancon kun aliaj produktoj kaj kun la akvo de la rivero, el ĝi eniris speciala ruĝa tinkturo, kiun li nomis karmezino, pro la fakto ke la insekto nomiĝis *qarmaz*.

Pere de tiu nova tinkturo li preparis belajn vestojn, kiu faris impreson sur la kordova kalifa kortego.

Post la forpaso de Abdeselam Ben Arrabat, lia idaro volis diskonigi ⁴⁷

neniam la sekreton de la nova tinkturo. Tamen, unu el la filoj ricevis grandan kvanton da mono, do li sciigis la originon de tiu koloro. Depost tiam, koĉo estas la bazo por ornami la plej belajn teksaĵojn.


Hodiaŭ la vorto "karmezino", kiu naskiĝis en Benarrabá (Andaluzio), nomas tiun brilan malhelruĝan koloron, konata kaj uzata en la tuta mondo.



Vilaĝo Benarrabá en la provinco Malago (Andaluzio)



Andaluzio



	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2								
3						■		
4		■			■			
5							■	
6					■			
7					■			
8		■					■	

HORIZONTALALE

1. Fari, ke iu decido aŭ dokumento estu laŭleĝa.
2. Fari ceremonion kiam oni malfermas al la publiko gravan aranĝon.
3. (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Karaktero de tio, kio estas tranĉa aŭ ĝia pinto pika. ■ Sufikso esprimanta plej altan gradon de grandeco.
4. Finaĵo de adverboj. ■ Sufikso uzata por formi nomojn de plantfamilioj el la nomo de ilia nomenklatura genra tipo. ■ Objekto, afero konkreta.
5. Grupo de plurjaraj herboj kun elbazaj folioj en rozeto. ■ Sur la aŭtomobiloj de Luksemburgio.
6. Mallonga memoriga enskribo. ■ Egipta dio de Suno.
7. (*Inverse*) Praa ĉina koncepto, kiu signifas inecon. ■ (*Adverbe*) Sincere kaj ame respektoplena al Dio kaj religiaj aferoj.
8. Pluralo. ■ (*Inverse*) Ĉevalbleko. ■ Finaĵo de adjektivoj.

VERTIKALE

- A. (*Plurale*) Lernantoj ĉe lernejo mezgrada, pli alta ol gimnazio.
- B. Interne. ■ (*Inverse*) Prefikso montranta, ke organika substanco diferencas de referenca parenca substanco nur pro unu grupo.
- C. Promeso kaj respondeco de iu, kiu prenas sur sin la respondecon de alia persono pri io aŭ iu.
- Ĉ. (*Plurale kaj akuzative*) Procedo de vendo per publika konkuro, ĉe kiu la proponanto de la plej alta prezo akiras la vendataĵon
- D. (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Granda rabobirdo. ■ Konsonanto, kiu ofte estas simila al ĥ. ■ Sur la hispanaj aŭtomobiloj.
- E. individuo de homo aŭ objekto kontraste kun la tuto de samaj aliaj ■ (*Inverse kaj adjektive*) Homo, dotita je superhomaj ecoj, akceptita inter la dioj post sia morto.
- F. (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Lana trikita korsaĵo aŭ ĵaketo, strikte vestanta la torson. ■ (*Inverse*) En iu loko.
- G. (*Inverse*) Fari parolan aŭ skriban defendon kaj pravigo de io aŭ iu, solene farita.

SOLVOJ AL LA VORTO-LUDOJ DE LA PASINTA NUMERO

Krucvorto

K	A	N	G	U	R	U	O
O	B	E	I	■	U	■	R
A	R	A	G	O	N	O	N
G	I	■	A	T	■	N	■
U	K	I	N	A	T	O	B
L	O	■	T	R	I	B	O
O	T	S	A	F	L	E	B
N	O	■	N	E	O	N	O

Vorta Piramido

O
 OM
 AMO
 DAMO
 DRAMO
 ADMIRO
 MIRIADO
 PIRAMIDO

Ĉu Vi ŝatas vorto-ludojn? Se jes kaj Vi kapablas solvi ilin, ne hezitu sendi al ni vian solvon, Vi ricevos specialan saluton.

info@esperanto.ac

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva


Ángel Arquillos López
Alejandro Burgos Escalante
José M^a Rodríguez Hernández
Carlos Spinola
Juan Díaz Casado
Alejandro Pinos Cabello
Yousef Hamdi el Farouki

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org





FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO FEDERACIO

84a Hispana Kongreso de Esperanto de la 14-a ĝis la 18-a de julio 2026

Provizora programo

Mardo 14/07

- 10:00/12:00 Akceptado de kongresanoj.
- 11:30/13:00 Prelego pri Portugalete kaj diversaj informoj (Jesús M. García).
- 15:30/18:00 Marŝado tra Portugalete. Renkontiĝo ĉe la kongresejo.
- 18:30/20:00 Interkona vespero.

Merkredo 15/07

- 10:00/11:00 Prelego. Libroservo. Akceptado de kongresanoj.
- 11:00/12:00 Prelego.
- 12:00/13:00 Malfermo de la kongreso.
- 15:30/18:00 Marŝado ĝis Sestao – Muzeo Rialia – Alta forno. aŭ Suprenirado piede al monto Serantes (452 m).
- 20:00/21:00 Muzika vespero ĉe la preĝejo de Sankta Maria.

Ĵaŭdo 16/07

- 10:00/11:00 Prelego. Libroservo.
- 11:00/12:30 Magio (T. Badía/M. Burrutxaga). Libroservo.
- 12:00/13:00 Prelego: Unamuno kaj origamo (Susana Zabaco). Libroservo.
- 15:30/18:00 Marŝado tra Getxo (pr. Geĉo) aŭ La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo. Per publikaj transportoj (Buso+Kablotramo).

Vendredo 17/07

- 10:00/11:00 Ĝenerala HEF-kunveno.
- 11:00/12:00 Kunveno de E-organizoj. Kunveno de la HEF-estraro kun E-grupoj.
- 12:00/13:00 Kongresa fermo.
- 13:00 Komuna foto ĉe la ĝardeno antaŭ la kongresejo.
- 15:00/19:00 Persipe al Bilbao laŭ la rivero. Suprenirado per kablotramo al monto Artxanda (251 m.). Panoramo de Bilbao. Vizito al malnova kvartalo de Bilbao. Vizito al E-Grupejo.

Sabato 18/07

- 09:00 Renkontiĝo ĉe la kongresejo. Enaŭtobusiĝo.
- 09:20/10:00 Vizito al La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo.
- 10:30/12:00 Forĝejo El Pobal.
- 12:20 Gallarta (naskiĝloko de Dolores Ibarruri, Pasionaria)
- 12:30/14:00 Muzeo pri Minejoj
- 14:30 Komuna bankedo en Portugalete.